

# Gvidilo kaj konsiloj por ILEI-kasisto-anstataŭanto dum UK

Sjoerd Bosga, 2008-07-15

## Ĝenerale

Kiel deĵoranto ĉe la budo aŭ anstataŭanto de la kasisto vi helpos al ILEI akcepti pagojn por kelkaj el niaj servoj. Tio estas gravega tasko! Ne nur pro tio ke ILEI bezonos la pagojn – sed ĉar niaj membroj atendas niajn servojn! Pro tio, plej grave estas detale noti kion homoj mendas, kaj komuniki la mendojn al la sekretario kaj kasisto de ILEI. Sur tiu ĉi paĝo vi trovos klarigojn pri la diversaj servoj por kiuj homoj povos al vi pagi, kaj instrukcioj kion vi faru en ĉiu kazo.

## Pri kvitancoj kaj kaslibra folio

Por ajna *enspezo*, necesas prepari **kvitancon**, en kiu aperu: servo, prezo, dato, kaj la nomo de la mendanto. Vi subskribas la kvitancon post ricevo de la sumo. Originalon ricevas la paganton, kopio estu transdonata poste al la kasisto. Se kvitanco temas pri *elspezo*, la ricevanto de la mono devas subskribi, kaj tiam la originalo restu ĉe ILEI. Ajna en- kaj elspezo devas esti notita sur **kaslibran folion**, menciante daton, numeron de kvitanco, persono al kiu rilatas, kaj lando de kie venas la persono. Tujtuje post la aranĝo la kaslibro folio kun la kopioj de la kvitancoj estu senditaj al la kasisto de ILEI.

## Membriĝo en ILEI

Eblas membriĝi por tiu ĉi jaro, aŭ por la venonta. Kotizo (2011) estas **18 €** por A-landanoj, **9 €** por B-landanoj, kaj inkluzivas paperan version de Internacia Pedagogia Revuo (IPR). Alternative, **8 €** (A-landanoj) aŭ **4 €** (B-landanoj) kun reta (PDF) versio de IPR. Membriĝo ne inkluzivas membrecon en landa sekcio – sed membreco en landa sekcio kutime inkluzivas membrecon en ILEI internacie. Kontraŭ pago de **20-obla kotizo**, oni membras por tuta vivo. Cetere, eblas ankaŭ nur aboni IPR-n, tio kostas 18 € sendepende de lando. Ĉiu membriĝo estu notita sur folion preparitan por tiu celo. Tujtuje post la aranĝo tiu folio estu sendita al la sekretario de ILEI, kaj kopio al la kasisto.

## Abono al Juna Amiko

Eblas aboni por tiu ĉi jaro, aŭ por la venonta. Abono kostas **14 €** por A-landanoj, **9 €** por B-landanoj. Se 3 aŭ pli da ekzempleroj estu senditaj al sama adreso, validas rabatita prezo por ĉiu abono: **11 €** por A-landanoj, **7 €** por B-landanoj. Al niaj oficialaj perantoj, ni donas 20% rabaton (ili do pagas resp. 11.20, 7.20, 8.80, 5.60 €). Ĉiu abono estu notita sur folion preparitan por tiu celo. Tujtuje post la aranĝo tiu folio estu sendita al la administranto de ILEI, kaj kopio al la kasisto.

## Partopreno en Internacia Ekzameno

Komence de la unua ekzamensesio necesas kontroli ke ĉiuj pagis kotizon por ĝi. Por tiuj kiuj antaŭpagis al ILEI, kotizo estas 40% de la "MA" kotizo de UEA. La kasisto pretigis liston de tiuj antaŭpagintoj. Tiuj kiuj ne antaŭpagis, pagu surloke 60% de "MA" kotizo de UEA.

Tiuj kiuj malsukcesas en la antaŭtesto rajtas ricevi duonon de la pagita sumo. Triono de entute kolektita sumo (antaŭpagoj plus surlokaj pagoj minus repagoj) estas la honorario por la ekzamenantoj. Ili ricevu tiun sumon post la lasta sesio – divido de la sumo inter ili vi faru interkonsente kun ili. La ceteraj du trionoj estas por la kaso de ILEI. ILEI el tio i.a. kovras la sendokostojn de ekzamen-materialo al la sekretario de IEK kaj eventualajn aliajn kostojn pro la ekzameno. Financa raporto de la ekzamensesio estu sendita al la kasisto de ILEI.

## **Kotizoj por la ILEI-konferenco**

Tiuj kiuj lastmomente aliĝas al la ILEI-konferenco aŭ pro aliaj kialoj ankoraŭ ne pagis sian tutan kotizon, povas pagi al vi.

## **Donacoj**

Eblas akcepti donacojn al la ĝenerala kaso de ILEI, aŭ por iu specifa celo. Ekzemploj estas la koleghelpa kaso (cele al kotizoj por ne-pagipovaj membroj), fondusoj Szerdahelyi, Dazzini, Erika Linz, aŭ al konferenca kaso. Se la donacanto specifikas celon, necesas ĝin noti sur kvitancon kaj en la kaslibran folion.

## **Vendo de libroj kaj unuopaj ekzempleroj de Juna Amiko**

ILEI vendas malnovajn ekzemplerojn de IPR kaj Juna Amiko kontraŭ **1 €**. Al tiuj kiuj reklamas mankantajn numerojn aŭ serioze interesiĝas membriĝi aŭ aboni eblas doni senpage. Manlibro pri instruado ni vendas kontraŭ **7,50 €** (same kiel la libroservo de UEA). "Okulo" kaj "Gvidilo por Okulo" ni vendas kontraŭ **4,50 €**, "Tendaraj Tagoj II", kaj "- III" kontraŭ **6,90 €**. "Tendaraj Tagoj I" estas elĉerpita, sed ni laboras pri renovigita eldono. "Fantaziaĵoj kaj Kantoj por Infanoj" ni vendas kontraŭ **3,60 €**.

## **Kolektita mono**

Mono de via kaso estu transdonita al la kasisto de UEA, cele al la konto de ILEI, ilek-a – kompreneble kontraŭ kvitanco kiu estu sendita al la kasisto de ILEI. Alternative eblas transdoni la monon al kasisto de ILEI-konferenco, ankaŭ kontraŭ kvitanco.

## **Utilaj adresoj, kontoj**

Ĝisdatigendaj.

Gravas atenti, ke ciferoj ĉe membrokotizoj kaj libroprezoj restu aktualaj, kaj ke novaj eldonaĵoj estu aldonitaj.